



## “Jugoslavia demando” ĉe la UEA-Komitato

Kiel ĉiam, ankaŭ dum la UK en Vieno la kongresanoj de “nia” jugoslavia terspeco estis en la mezo de intereso.

Do, unue, kvankam UN proklamis sankciojn kontraŭ la nova Etjugoslavio, inkluzive ankaŭ Serbion, dum la inaŭguro salutis la kongreson inter aliaj ankaŭ la prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo, JEL. La klarigo simple estis, ke la sankcioj ne koncernas la esperanto-movadon! (Sed ĉu la E-movado ne plu apartenas al kulturo, pri kio oni skribas en la UN-decido?) Samtempe la kongreson inter aliaj salutis ankaŭ la reprezentantoj de Kroatio, Slovenio kaj Makedonio.

La dua interesajo okazis dum la komitatkunsido, kiam oni devis pridiskuti la aliĝojn de novaj organizoj. (Rim. de red.: Jugoslavia Esperanto-Ligo estis federacio de 5 respublikaj e-ligoj el Bosnio-Hercegovino, Kroatio, Makedonio, Serbio, Slovenio kaj 1 provinca kaj 1 faka asocio. Ene de la federacio la membraj organizoj agadis tute memstare.)

Estis agnoskrite, ke JEL ne plu funkcias en la antaŭa formo (Kroatio kaj Slovenio kun siaj E-organizoj iĝis internacie rekonite sendependaj), do aperis la demando, kiel solvi la membriĝon en UEA de la tieaj organizoj. Laŭ la preskriboj de la UEA-regularo venis 2 aliĝpetoj el Kroatio, (ĉar funkcias du e-organizoj, sed kelkajn tagojn antaŭ la kongreso unu el ili retiriĝis), kaj el Slovenio. Ŝajnis al multaj, ke ne devus esti problemoj, sed male, la diskuto daŭris laŭ iuj kalkulantoj eĉ 20 % de la tuta kunsidtempo.

La problemon kaŭzis tio, ke kvankam de la iama Jugoslavio petis aliĝon nur du organizoj, la komitata komisiono proponis rezolucion, laŭ kiuj oni akceptu ĉiujn, kiuj membriĝas pasintjare junio en JEL. (Membroj de JEL estis ankaŭ E-Ligo el Vojvodino kaj E-Ligo el Montenegro, sed la proponita rezolucio ne koncernas ilin!)

La vera diskuto fakte estis direktita al la kono pri la UN-sankcioj, internacia rekono de ŝtatoj, kaj pri formale senditaj aliĝpetoj. Alparolis tre multaj, kaj estis formulita nova propono de Tonkin, ke estu akceptitaj nur la formalaj aliĝintoj. Kiam oni pensis ke jam venis la fino kaj restis nur la akcepto de la du aliĝoj, kiu estis voĉdonita pozitive, venis paŭzo kaj ĉio ŝanĝiĝis.

daŭrigo sur la paĝo 5.

## Al kiu gento apartenis d-ro L.L. Zamenhof?

Trafoliumante diversajn publikaĵojn en esperanto kaj en etnolingvoj - propagandilojn, didaktikajn verkojn, historiojn de esperanto, biografiojn pri Zamenhof - oni trovas jen mankon de precizaj informoj pri la genta apartenado de Zamenhof, jen kontraŭdirajn “faktojn”. La plej oftaj karakterizoj estas “la pola d-ro L.L. Zamenhof”, “la pola okulisto” kaj “la pola kuracisto”. De tempo al tempo oni nomas lin ruso. Malofte oni diras la veron: li estis judo (aŭ hebreo, laŭ la malnova lingvouzo).

Zamenhof ne povas esti membro de la pola gento. La aŭtoro de esperanto mem difinis la vorton “gento” jene: “la aron de ĉiuj homoj, kiuj havas saman devenon kiel mi, mi nomas mia gento”. Plena Ilustrita Vortaro (PIV) difinis “polo” jene: “ano de ĉefgento loĝanta en Polujo”. En pluraj verkoj Zamenhof klarigas, ke li apartenis al minoritata gento en Polujo; sekvas, do, ke li ne estis ano de la pola ĉefgento. Li neniam povis esti eĉ civitano de Pollando, ĉar la sendependa respubliko estiĝis nur post la morto de Zamenhof en 1917. Dum sia tuta vivo Zamenhof estis regato de la cara Rusia Imperio. Zamenhof konstatis pri la estiĝinta konfuzo kaj eksplicite neis sian polecon. En letero sendita al la Loka Kongresa Komitato de la UK en Krakovo en 1912, Zamenhof skribis: “(...) ne nomu min ‘polo’ por ke oni ne diru, ke mi - por akcepti honorojn - metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas (...) laŭ mia deveno mi alkalkulas min al la gento - hebreo” (la emfazo estas de Zamenhof).

En poŝtkarto sendita al s-ro Theodor Cejka el Bystrice pod Hostynem en 1906, Zamenhof informis, ke lia nacio estas “ruslanda hebreo”, lia religio “hebreo-hilelita” kaj la “lingvo de mia gepatra domo estis la lingvo rusa”. Rimarku: hejme li ne parolis la polan lingvon. Plue, la familia nomo “Zamenhof” ne estas pola. En letero al berlinaj esperantistoj en 1904, Zamenhof klarigis, ke ĝi estas germana nomo (originale Samenhofer), kiu li fonetike transskribis per “z”.

Jam estis publikitaj pluraj fotografiaĵoj, tajpitaj kopioj kaj tradukoj de oficialaj ruslingvaj dokumentoj, kiuj plej objektivaj pravas, ke Zamenhof estis judo. Lia naskiĝo estis registrita en la matrikullibro de la Juda Komunumo de la urbo Bjalistoko kun indiko ankaŭ de la dato de cirkumcido. La “Atesto pri Matureco”, kiun la juna gimnaziano ricevis en 1879,

komenciĝas per la sekva vorto: “Tiu ĉi estas donita al Lazar Zamenhof, de la Hebrea konfesio (...)”.

Kvankam ekde la unuaj jaroj de la historio de esperanto Zamenhof neniam kaŝis sian judecon, aliaj homoj intence prisilentis tion. Kial? La respondo estas simpla: pro daŭra judofobio kaj antisemitismo en kaj ekster la esperantomovado.

### Rimarkigo pri la nomformoj:

Efektive, Zamenhof mem respondecis pri la konfuzo - se ĝi ekzistas - ĉar li plurfoje ŝanĝis la nomformon. Lia “plejplej” unua nomo estis la hebrea “Eliezer”. Ĝi estis oficiala nomo. Por ĉiutagaj celoj estis uzata la jida ekvivalento “Lejzer”. Kun tiu nomo Zamenhof eniris la varsovian gimnazion en 1874. Sur la lernejaj dokumentoj ĝi aperas per cirilaj literoj kiel “Lejzer”. Sur dokumento de la jaro 1876, kiam Zamenhof estis en la 6-a klaso, aperas la nomo “Lazar”. Tamen, kelkaj postaj dokumentoj havas la nomformon “Lejzer”. En 1879 Zamenhof mem subskribis “Lazar”, sed samjare ankaŭ “Lejzer”. Poste denove “Lazar”. Kiel universitatano li fariĝis “Lazar Markoviĉ Zamenhof”.

Bernard Golden, Hungario

### Rimarkigo de la redaktoro de Starto:

La klarigon ni povas kompletigi laŭ la “Senlenda biografio de L.L. Zamenhof” (1982) de la japana aŭtoro Ludovikito (p.11): Je la fino de la 19-a jarcento aldoniĝis pli ĝenerala nomo “Ludoviko” kaj li nomiĝis Lazaro Ludoviko Zamenhof.

El Starto, 6/1991.



# KONSTRUI, JES, SED NE EL NUBOJ

## Organizaj demandoj

La artikolo de Joachim Werdin, "UEA: Ĉu ne kapabla?" (Eventoj: 0015, oktobro/1) montras bonan volon, sed samtempe pravas denove, ke estas pli facile identigi problemojn ol trovi la solvojn.

Ne estas novaĵo ke mono mankas al UEA, kiel al la tuta movado/komunumo. Dum lingvojn kutime subtenas registaroj, aŭ almenaŭ geografie kohera parolantaro, esperanton subtenas nur libervolaj kontribuoj de disaj unuopuloj. Tamen ne helpas, simple fantazii pri dekobliĝo de niaj spezoj aŭ duobliĝo de nia membraro sen iu ajn reala bazo por efektiviĝi tion.

### Ni devas konsideri la realajn eblecojn

Werdin proponas, ke ni "analizu la sistemojn uzatajn de similaj internaciaj organizaĵoj". Sed kie ili troviĝas? UEA estas multrilate unika, nelaste pro la fakto, ke necesas lerni esperanton por ke membreco estu sencohava. Dum aliaj movadoj bazas sian allogon (kaj do: kreskokapablon) sur ideoj nur, UEA postulas konkretan kaj relative malfacilan agon: lerni lingvon. Praktike ĝia "merkato" konsistas el tiuj, kiuj jam parolas esperanton - societo, kiun Bernard Golden samnumere taksis je malpli ol 100 000 homoj, el kiuj pli ol duono vivas en ekonomie malfortaj landoj. Se oni konsideras, ke nia financa kaj homa bazo estas malpli larĝa ol tiu de multaj t.n. "malgrandaj" indiĝenaj lingvoj, oni venas al pli realisma takso de niaj eblecoj.

### 14 mil guldenoj por la azia agado!

Baze, mi dividas la malkontenton de Werdin pri la nuna situacio, sed li ankaŭ troigas - nelaste pri tiu tereno, pri kiu li mem devus plej bone scii. Dum tri jaroj UEA subtenis lian agadon en Azio je pli ol 14 mil guldenoj; ĝi ĉesigis tiun subtenon antaŭ unu jaro pro seriozaj duboj, ĉu tiu agado efektive portas daŭrajn rezultojn. UEA tamen daŭre investas al la azia movado sub la gvido de sia energia

estrarano So Gilsu, same kiel de jaroj ĝi investas al Afriko laŭ la klarvidaj konsiloj de Hans Bakker. Eŭropanoj eventuale ne rimarkas tiun agadon, sed por miloj da ne-eŭropanoj UEA estas la sola organizaĵo, kiu serioze klopodas inkluzivi ilin en la e-movadon.

### UEA havas pli ol 50 "filiojn"!

Al la demando, kial UEA ne havas "branĉojn en dekoj da landoj", la respondo kompreneble estas ke ĝi ja havas: la aliĝintajn landajn asociojn. Estas vere, ke multaj landaj asocioj ne tre efike plenumas sian rolon, sed mi vere dubas, ĉu ili pli bone farus tion stirate el Roterdamo. Se temas pri regionaj aŭ fakaj oficejoj, oni eksperimentis pri tio en la okdekaj jaroj kun plejparte negativaj rezultoj. Tio ne signifas, ke ne indas provi denove kaj alimaniere, sed oni konsciu pri jam spertitaj malfacilaĵoj.

### Kie estas tiuj centmiloj da abonantoj?

Kiel eksredaktoro de Esperanto, mi ridetis pri la alvoko por "sencenzura libereco kaj financo". Finfine realiĝus mia revo: koloraj bildoj de senvestitaj UEA-estraranoj sur la mezaj du paĝoj! Sed serioze: la sola grava formo de cenzuro en la revuo estas la limigo je 20 paĝoj ĉiumonate, kaj la klopodo plaĉi al kiom eble plej da homoj samtempe. la "desupra" politika cenzuro simple ne ekzistas. Ĉe la financa flanko, Esperanto-n jam abonas pli da homoj ol iun ajn alian movadan revuon: kie ni serĉu la "dekojn aŭ centojn da miloj da abonantoj", kiuj ebligis pli ampleksan kaj luksan revuon? Denove ni revenas al la malgrandeco de nia pagipova socia bazo.

### Ne simple plendu, ankaŭ agu!

Kvankam la kritikoj de Joachim maltrafas en detaloj, tamen li principe pravas: UEA ne povas simple daŭrigi laŭ la modelo de la lastaj 45 jaroj.

Pri tio mi kaj pluraj el miaj estraraj kolegoj estas konvinkitaj. Jam ekis strategia diskuto en la nova estraro, kiu espereble provizos bazon por kelkaj drastaj reformoj. Ĉar la Asocio por Progresigo de UEA jam ekzistas: ĝi estas UEA mem, ĝia membraro, ĝiaj aktivuloj. Organizaĵojn, same kiel ŝtatojn, oni ne reformas de ekstere (kvankam ekstera kritiko povas esti utila sprono!). Pro tio mi bonvenigas la atenton al UEA en Eventoj, sed mi alvokas: ne simple plendu, agu!

### UEA ne estas tiuj... en Roterdamo, UEA estas ni ĉiuj!

Vi povis jam legi pri la komitatkunsidoj en Vieno: se tiu maniero stiri la asocion ne plaĉas al vi, anstataŭigu viajn komitatanojn! Vi scias pri la membrokampanjo: se vi volas, ke UEA kresku, varbu por ĝi! Vi konas la revuon Esperanto: se vi trovas ĝin teda, verku ion pli interesan! Se vi malkontentas pri la membrokotizoj, bombardu la estraron kaj oficejon per plendleteroj! UEA ne estas "tiuj... en Roterdamo"; ĝi estas ĉiuj, kiuj kontribuas al ĝi.



### Reagoj estas tre bonvenaj

Verŝajne post la februara estrarkunsido eblis publikigi iun projekton de nova strategio, nome de la tuta estraro. Kunmetante ĝin, ni klopodos konsideri ĉiujn vidpunktojn esprimintajn en EVENTOJ kaj aliaj e-gazetoj: tio estas evidente nia tasko, se ni volas, ke UEA daŭre (aŭ denove) respondu al la deziroj de la esperantistaro. Mi do aliĝas al la fina alvoko de Joachim: reagu, jes, kaj amase! Sed ĉesu pensi pri la estraro kaj aktivuloj kiel iu senmova anonima maso, kaj rigardu la homojn kaj la faktojn antaŭ ol ekkonstrui kastelojn. Alie tiuj ĉi konsistoj el nuboj.

Mark Fettes  
estrarano de UEA  
pri informado kaj eksteraj rilatoj

## Faka aplikado

### ESPERANTO KAJ HERALDIKO

Kiel konate, la heraldiko estas unu el la branĉoj de la historia scienco. Ĝi enhavas aron da reguloj por vere studi, krei kaj priskribi iun blazonon.

En la estinta Sovetio ankaŭ tiu scienca branĉo estis deflankigita de la vera vivo, kaj ne havis sian evoluon kaj meriton. Tamen dum al lastaj jardekoj en la lando estas rimarkita tre granda intereso, precipe flanke de la junularo pri tiu temo. Tiu procezo estas aosa, ĉar ne ekzistas iu sistemo ĝin reganta. En la pasinta jaro, dum la unua kongreso sia, la amatoroj de la heraldiko fondis tutlandan heraldikan societeton. Ankaŭ mi nun estas membro de tiu societo. Min interesas tiu temo, sed iom el alia vidpunkto. Ekzistas en multaj landoj speciala heraldika terminologio nacilingva, permesanta tre kurtajn priskribojn pri la koncernaj blazonoj. Ekzemple, jen la ruĝa koloro heraldika en kelkaj lingvoj: angla *gules*, franca *gueules*, germana *rot*, hispana *gules*, (e-a 'ruĝo'). Kaj oni diras, ke en la heraldiko jam ekzistas iuspeca internacia lingvo, kiu faciligas la komprenon de la signifo de blazonoj. Kial do ni, esperantistoj ĝis nun ne aplikis nian lingvon al tiu branĉo? Jes, jam okazis unu provo tion fari. Antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj aperis libro de J. Klement kun la titolo *Heraldiko, veksilologio: terminaro en Esperanto*. Tamen tio estis nur la unua paŝo kaj bedaŭrinde pro la forpaso de tiu talenta homo la sekvaj paŝoj ne okazis.


Mi preparis kaj jam prezentis por eldonado en Moskvo mian unuan libron: *Mallonga ilustrita heraldika vortaro*. Ĝi enhavas 750 terminojn en ses lingvoj, inkluzive de esperanto. Nun en preparo estas pli granda termi-

naro en kelkaj lingvoj. Ankaŭ planataj estas specialaj e-lingva kaj aliaj vortaroj. Tamen dume ne sufiĉas materialoj por pli efika laboro. En la sovetiaj bibliotekoj ne ĉiam ekzistas necesaj libroj.

#### Kelkaj ekzemploj de terminoj



- e. trabo
- a. fess
- f. fasce
- g. Balken
- h. faja
- r. pojas



- e. bordero
- a. bordure
- f. bordure
- g. Bord
- h. bordura
- r. kajma



- e. bendo el dekstro
- a. bend
- f. bande
- g. Schrägrechtsbalken
- h. banda
- r. perezvaj' sprava



- e. lozengumita
- a. lozengy
- f. losangé
- g. gerautet
- h. losangeado
- r. razdelonnij rombovidno

Mi estus dankema al ĉiu leganto, kiu trovas eblon iel helpi pri tiu problemo. Estas bezonataj libroj heraldikaj en la angla, germana, franca kaj hispana lingvoj. Temas unuavice pri terminaroj, vortaroj, bildlibroj, ktp. La kompenso estas antaŭvidebla. Antaŭdankon.

N. Starodubcev, abonkesto 191, UKR-340  
000 Doneck, Ukrainio.  
Laŭ La Gazeto, 15jun92.

## NOVA ŜANCO por esperanto

Post falo de komunista reĝimo en Orienta Eŭropo ekestis nova ekonomia situacio, kio prezentas al esperanto historian ŝancon fariĝi vera internacia komunikilo ankaŭ ekster tradiciaj esperantistaj rondoj.

Venkanta demokratio kaj kolapso de diktaturoj forigis ŝtatan monopolon pri internaciaj rilatoj. Samtempe la postkomunismaj landoj trafis en profundan ekonomian krizon. Tio kune vekis amasan ekonon kaj bezonon pri internaciaj kontaktoj (precipe komercaj).

Necesas noti, ke en tiuj landoj mankas grandaj, efektive agantaj solidaj perantoj, kiuj povus kontentigi la eksterordinaran postulon de la merkato. Ĉi-momente ankaŭ la okcidentaj perantoj ankoraŭ ne multon ofertas al tiu merkato.

En tuta Orienta Eŭropo klare videblas grava ekinteresiĝo pri lernado de fremdlingvoj (tio postulas la ekonomia vivovolo) kaj regreso de e-movado (ĝi restis pro sia nulkultura orientiĝo kiel hobia, al kio malsatuloj ne havas tempon - ili bezonas efektivan perilon por kontaktoj ekonomiaj).

En tiu ĉi cirkonstanco esperanto (pere de e-movado) havas eksterordinaran okazon fariĝi se ne ĉefa, do almenaŭ unu el ĉefaj lingvoj por perado de komercaj informoj en tiu mondoparto.

Por ke la lingvo povu merkatumi (vendigi), ĝi bezonas materiajn informportantojn, kiuj povus konvinki komercistojn pri ekonomia utilo de esperanto. Kiel unua en tiu sfero notindas komerca gazetaro por informado kaj reklamo. Sed kion ni havas por tio? "La Merkato, Monda Merkato, EKA-paĝoj en La Eta Gazeto" - ili estas ja tro modestaj por konvinki entreprenistojn aĉeti iliajn servojn. Havas ni *Esperanton*, *Monaton*, *Heroldo de Esperanto*-n, kiuj estas bonaspektaj kaj kun jam konsiderebla eldonkvanto - sed ili ne estas fakaj kaj pro tio nesufiĉe taŭgaj.

Por ne tradormi nunan favoregan situacion, UNIVERSAAL-KOOPERATIV AITAI penas trovi reeĥon en e-movado por efektiviigi intencon eldoni fakan e-lingvan gazeton "LA KOMERCISTO", kiu per siaj aspekto, eldonkvanto, enhavo, tutmonda distribuado, prezoj ktp. estu al komercistoj alloga.

Bedaŭrinde, multaj e-organizaĵoj rilatas al la iniciato kun indiferento aŭ eĉ kontraŭstaras.

Aplikado de esperanto en internacia komerco donus al la lingvo novan ŝancon. Tempo urĝas - la unuaj favoregaj cirkonstancoj konserviĝas ne longe. Morgaŭ povos esti jam malfrue. Ekagu tuj!

Peeter Aitai

El "Informoj de E-Asocio de Estonio",  
nr-o 3, 1992.

Internacia  
Vendo-Reto  
SORTIMENTO



Kiskunfélegyháza  
Pf: 138  
6100 - Hungario

## Alvoko!

Karaj geamikoj,

certe vi konas la libron "La danĝera lingvo" de Ulrich Lins, en kiu li priskribas la persekutadon de esperanto per la nazioj kaj la stalinistoj. Malgraŭ la alta valoro de tiu ĉi libro mankas ankaŭ al ĝi personaj priskriboj, rakontaĵoj.

Ni, tio estas du studentoj el sudgermana urbo Freiburg, volas savi tiujn personajn memoraĵojn - ja estas nur tempa demando, kiam ili malaperas el nia aŭdeblo kune kun la memorantoj. Tial ni nomis nian projekton "Savu la memoron", kiu

estas finance kaj morale subtenata de "FAME-fondaĵo", fondaĵo por akcelado de internaciaj interkompreniloj.

Nia celo estas, persone kontakti homojn, kiuj travivis la tempon de persekutado de esperanto en Germanio inter 1933 kaj 1945. Ni celas personajn rakontojn pri la eventoj, la reago de esperantistoj ktp. Ĉi tiun leteron al vi ni skribas, ĉar ni supozas, ke eble ankoraŭ vivas ĉe vi kelkaj, kiuj devis sperti tiun tempon en Germanio. Ni havas la grandan peton al vi, helpi nin kontakti tiujn homojn.

Konrad Gramelspacher  
Faulerstr. 10.  
D-W-7800 Freiburg  
Germanio

## Aranĝoj

Invito al la 9-a

### Internacia Medicina Esperanto-Konferenco (IMEK)

Kunorganizata de la hungara landa sekcio de UMEA (*Universala Medicina Esperanto-Asocio*) kaj AIS (*Akademio Internacia de Sciencoj*) la 9a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco, IMEK okazos inter 8-11 de julio 1993. en Veszprém, Hungario.

La medicin-temaj fakaj prelegoj povas esti prezentitaj krom esperanto ankaŭ en aliaj lingvoj. Krom la fakaj programeroj estas antaŭvidata vizito al lokaj medicinaj institutoj, kaj tuttaga ekskurso. Estas bonvenigitaj ankaŭ la familiajnoj de kontribuantoj.



**Partoprenkotizo:** ĉ. 100 NLG.


Pri la aliĝo, pagmaniero kaj prelego-propono skribu al la organizanto:

*D-ro István Hegyi,  
H-8200 Veszprém, Batthyány u.19. D.2/9,  
Hungario.*

### Printempa Semajno Internacia

09-16. de aprilo, 1993.

La 9a PSI okazos en Oberbernhards/Rhön, organizata de Germana E-Asocio. La aranĝo direktas sin ĉefe al la mezaĝa generacio kun aŭ sen infanoj - sed ankaŭ aliaĝuloj, kiuj harmonias kun infanoj estas tre bonvenaj. Ni planas apartan prizorgon de grupo da 10 ĝis 14 jaruloj.



La aranĝon partoprenas kutime ĉ. 100 homoj. Krom la lingvokursoj la programo grandparte dependas de la partoprenantoj.

Malgraŭ la tre favoraj kotizoj, la domo estas sufiĉe luksa.

Petu pliajn informojn de:

*Wolfgang Bohr,  
Johannes-Kirschweg str. 11, DW-5483  
Bad Neuenahr-Ahrweiler, Germanio.  
Telefono: +49-2641-4885.*

### ESPERANTO AGO-TAGO EN MOSKVO

Ĉi-jare ankaŭ en Moskvo la unuan fojon pasis la Internacia Tago de Esperanto en formo de piketado kaj malgranda manifestacio, kiun preparis kaj efektivigis Rusia Esperanta Unio (REU), Esperanto-Radikala Asocio, SEJM kaj la moskvaj e-klubo (ĉefe la klubo *Leo Tolstoj*). La ĉefa slogano estis: "Por egalrajteco en la internacia komunikado".

Bedaŭrinde, pro la ĝenerala malpermeso far la urbestro organizi manifestaciojn apud la televidcentro, tie ion fari ne eblis, tamen estis ricevita permeso por la placo kontraŭ la moskva urbodomo (en centro de la urbo, kie abundas preterpasantoj). Preskaŭ dum la tuta tago (8 horojn!) ĉ. 40 esperantistoj staris kun verdaj standardoj kaj sloganoj: "Internacia tago de Esperanto", "Ne al la interetna malamo", "Plenan egalrajtecon al ĉiuj lingvoj", "Esperanto - la dua lingvo por ĉiuj". La elekton de la sloganoj diktis la streĉa situacio en interesaj kaj lingvaj rilatoj ĉirkaŭ Rusio kaj ĝenerale sur la ekssovietia teritorio.

Estis disdonitaj ĉ. 850 flugfolioj kun la

teksto pri la celo de la manifestacio kaj bazaj informoj pri la lingvo esperanto kaj ĝia utilo (kun la kontaktadreso de REU). Informojn pri la manifestacio ricevis ĉiuj ĉefaj moskvaj kaj rusiaj amaskomunikiloj kaj informagentejoj. La du plej popularaj urbaj gazetoj, la moskva radio (dufoje) kaj semajna gazeto de la Unio de Ĵurnalistoj sufiĉe detale kaj objektivie informis pri la aranĝo kaj lige kun ĝi - pri esperanto.

Fine okazis malgranda mitingo, kiun partoprenis kelkdek personoj (moskvaj esperantistoj, eksterlandaj gastoj el Japanio, Hispanio kaj Kartvelio, la plej interesiĝintoj pri la afero el la ekstera publiko kaj kelkaj ĵurnalistoj). Tie parolis prezidanto de REU V. Aroloviĉ, UEA-ĉefdelegito en Rusio M. Ĉertilov, interlingvisto prof. S. Kuznecov, prezidanto de la e-klubo "Leo Tolstoj" N. Gudskov, reprezentanto de SEJM kaj TEJO G. Kokolija k.a. Post la mitingo la ĉeestantoj marŝis kun la standardoj kaj sloganoj al la domo, kie dum studado en



Foto el Sennaciulo 92/11.

la moskva universitato loĝis L. Zamenhof (ĝi troviĝas proksime de la urbodomo), kie la aranĝo finiĝis.

*N. Gudskov, Moskvo  
vic-prezidanto de REU*

### Pli favoraj kondiĉoj por partopreni IJK-on

Interkonsente kun TEJO-estraro, LKK de la sekvajara Junulara Kongreso en Vraca faris kelkajn ŝanĝojn en la kondiĉoj pri aliĝo:

- Se vi jam aliĝis kaj antaŭpagis al la kongreso tamen vi ne povos partopreni, la antaŭpago kaj kongreskotizo estas transdonebla al alia persono! (La kotizon oni alĝustigas laŭ la aĝo, TEJO-membreco kaj lando de la nova persono).
- Por aliĝintoj el Albanio, Bulgario, Ĉeĥio, Hungario, landoj de ekska Jugoslavio, Polio, Rumanio, Slovakio, landoj de ekska Sovetunio, Latin-Ameriko, Afriko kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko) kiel dato de aliĝo validas la dato de ricevo de antaŭpago (minimуме 50 % de la kongreskotizo). Tiu antaŭpago transdoneblas al alia persono, sed ne riceveblas en kazo de ne-partopreno.
- Bulgaraj esperantistoj kaj organizoj povas pagi la ekvivalenton de la antaŭpago kaj kongreskotizo en levoj, favore al alilandaj esperantistoj.



Certe tiuj ŝanĝoj de la aliĝkondiĉoj donos pli da eblecoj frue aliĝi al la kongreso.

En la aliĝilo pro



## ijk

teknika eraro estas mise presita la rabato por la supremenciitaj landoj. Tiu rabato estas 15 USD. Kromajn 15 dolarojn kiel rabato ricevos la individuaj membroj de TEJO el tiuj landoj.

*Ljubomir Trifonĉovskij, prez. de LKK*

*Rim. Peranto por Hungario estas LINGVO-Studio. Do, hungaraj esperantistoj povas pagi la kongresan kotizon en forintoj al la kutima al vi adreso: H-1675 Budapeŝt, pk. 87. (... t.e. redakcio de EVENTOJ).*

Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK

# IEK-93

17-23. de julio, 1993.

IEK-93 okazos okazos en la hungara "vilaĝo" Kondoros, kun la konferenca temo: "Kial paroli esperanton?". Krom la prelegoj kaj diskutoj, aljuĝo de la OSIEK premio okazos riĉa kultura programo, bankedo, balo ktp. Partopreni povas ankaŭ ne-membroj de OSIEK.

**Kotizoj:** egalvaloro de 52 ekuoj (ĝis la 1-a de februaro). Por ne-membroj de OSIEK: 70 ekuoj. Rabatoj: Studentoj: 30 %, orient-eŭropanoj: 50 %.

Pliaj informoj ĉe la kasisto de OSIEK:

*Eric Laubacher, 1 rue des Vosges,  
F-78180 Montigny-le-Bretonneux, Francio.*

# ILEI

## Kiel instrui por ne perdi kursanojn

La legantoj certe aŭdis pri la fenomeno, ke dum kursoj, gvidataj laŭ Cseh-metodo, malofte iu lernanto forlasis ĝin, sed, kontraŭe, tiaj kursoj ofte finiĝas kun pli da kursanoj ol komenciĝis, kompreneble se gvidis ĝin bona Cseh-instruisto.

### Bazaj principoj de la Cseh-metodo

Ĝis nun oni ne analizis tiun fenomenon, kvankam neniu alia instrumentado atingis tian rezulton. Mia opinio tiu fenomeno de Cseh-metodo fontas ĉefe el jenaj bazaj principoj de la metodo:

- fremdlanda instruisto, kiu kapablas instrui al plurnaciaj lernantoj (por krei naturajn kondiĉojn komuniki el lernata lingvo);
- ne-uzo de lernolibro kaj nacia lingvo (por lerni pensi en lernata lingvo);
- konversacia formo (por uzi parole la lingvon ekde la unua leciono);
- komprenigado de vortoj kaj gramatikaj reguloj per prezentado de objektoj, per gestoj, konvenaj ekzemploj kaj ekzercoj (por pli facile kompreni la funkciadon de la lingvo);
- sekvo de la didaktika regulo gvidi la lernantojn de konaĵo al nekonaĵo, kiun Cseh nomis "gimnastiko por la cerbo", per uzo de jam konataj vortoj por skribi la nekonatan (ekzemploj troviĝas en la Konversacia Vortareto);
- sekvo de la metodikaj paŝoj (necesaj por ĈIU instrumentado):
  - a) prezento de nova materialo
  - b) praktikado kun eventuala korektado
  - c) ripetado pere de aplikado.

### Kapabloj de la instruisto

El la ĵus menciitaj principoj oni povas konkludi ke sukceso aŭ malsukceso ĉefe dependas de la kapabloj de la instruisto. Bonan instruiston oni bezonas por ĉiu-speca kurso, kompreneble. Cseh diris: "Instruisto kapablas sukcesigi la plej malbonan metodon kaj detruu la plej bonan." Bona Cseh-instruisto estas trejnata instrui la lingvon ĉefe al plurlingvaj lernantoj. Ŝi/li devas

- ŝati instru-laboron kaj facile kontakti kursanojn;
- bone koni, kompreni kaj uzi parole Esperanton;
- esti konviktita pri la valoro de Esperanto
- kompreni la metodon kaj fidi en ties efiko;
- esti kapabla kapti atenton kaj teni ĝin dum la tuta renkontiĝo;
- esti aktiva, sprita, eĉ aĉoreca, sed precipe natura kaj pacienca;
- esti kapabla krei amikan etoson, vigligi kursanojn, vekii intereson, racie prezenti la lingvon, montri la praktikajn valorojn de Esperanto, adaptiĝi al ofte ŝanĝigan-

## La "jugoslavia problemo"

daŭrigo de la 1-a paĝo  
Do, la komitatoj estis petataj voĉdoni por la unua prezentita rezolucio, ĉar la proponito Tonkin rezignis pri la jam voĉdonita. Venis iom da konfuzo, kaj eĉ protestoj, sed tamen oni voĉdonis.

La rezolucio konstatas, ke JEL ne plu ekzistas en la iama formo, kaj oni prenas ĉiujn tiamaĵajn membrojn krom la jam menciitaj, kiel aliĝintaj landaj asocioj. Do, tamen se iu rezignas, tion povas konfirmi



Dumpaŭza solvado de la eksjugoslavia "problemo" Wells, Moon, Tonkin

dum certa tempo, se ne, simple sendi statuton kaj aliajn necesajn dokumentojn. Tio signifas, ke Jugoslavio eliris el UEA, kaj Serbio eniris! Tiunmaniere, plej verŝajne UEA estas inter la unuaj internaciaj organizoj, kiuj rekonis Serbion! Mi persone havas

- taj kaj ne antaŭvideblaj kondiĉoj kaj situacioj;
- esti inventema, konsekvenca kaj akurata, sed ne enuiga;
- esti tre bone preparita por ĉiu renkontiĝo;
- havi bonan kaj klaran prononcadon;
- ne paroli mem tro multe, sed gvidi konversacion, uzante KI-demandojn kaj evidente ĈU-demandojn.

Traleĝinte tiujn postulojn oni povas dubi ĉu tia instruisto ekzistas. Parte dubantoj pravas, ĉar mi ja prezentis idealan Cseh-instruiston kaj mi scias ke idealoj ne ekzistas, tamen oni devas konscii al kio strebi kaj kion provi atingi!

Manko de devoj karakterizas la metodon: ĉio okazu libervole; la kursanoj ja venas ankaŭ libervole al la kurso! La etoso estu agable leĝera, do alloga por reveni (sen lerneja disciplino). Tamen... estas tasko de instruisto gvidi la tuton tiel, ke la kursanoj post ĉiu renkontiĝo tuj spertu utilon kaj havu la senton ke ili lernis ion novan. Manko de tiu sento kaŭzas perdon de kursanoj!

Intence en la libro Baza Cseh-kurso, kun metodikaj konsiloj por kursgvidantoj, la instru-materialo ne estas dividita en lecionojn, sed en punktojn kaj temojn, por ke la instruisto povu facile adapti ĝin al la nivelo de kursanoj kaj uzi ĝin laŭ bezono kaj ne laŭ devo (al kio devigas libro, dividita en lecionoj).

Resume mi citas la eldiron de Andreo Cseh ke "kurso fiaskas ne pro malbonaj ler-

nenion kontraŭ esperantistoj el Serbio, kaj ili povas esti individuaj membroj de UEA - kiel privataj personoj, sed por la oficiala organizo nomata Serbia E-Ligo dume ne validas la sankcioj. Laŭ mi ja temas pri kulturo, priskribita en la rezolucio n-ro 757 de UN.

Fine ni aldonu, ke laŭ la opinio de certa parto de komitatoj la afero estis farita kontraŭ la statuto kaj regularo.

M. Beloŝeviĉ  
el Kroata Esperantisto, 2/92.

Rim.de red.: La rezoluciproponoj estis perbuŝe prezentitaj al la komitatoj. Ĝi tekstis, ke "la membroorganizoj de JEL oni invitas membri en UEA". Ĝuste tiu formulado ne estis klara, kaj post la voĉdonado evidentiĝis, ke kelkaj komprenis ĝin tiel, ke ĉiuj membroorganizoj estis akceptitaj, dum aliaj opiniis, ke la aliĝo validas nur post la formala aliĝo. (Estus "ne kutime" akcepti iun organizon kiel Landa Asocio sen formala aliĝo kaj sen vidi ties statuson...)

Estis nekomprenebla la maniero de la voĉdona proceduro (oni daŭrigis la debaton pri la jam voĉdonita propono), kaj estas apenaŭ digestebla la antaŭvoĉdona premo al la komitatoj, kiam ili estis alvokitaj por ne kontraŭvoĉdoni! (Tamen estis unu kontraŭvoĉo).

nantoj sed pro nebona instruanto". Pri tio oni klopodas edukcele konscii la Esperanto-instruantojn dum Cseh-seminarioj, por ke ili estonte ne perdu kursanojn, ĉar tiuj perditoj jam ne plu revenos kaj ofte fariĝos kontraŭuloj de Esperanto. Kaj ĝuste tion ni nepre evitu!

Mila van der Horst-Kolinska,  
Internacia Pedagogia Revuo 1/92.

Pri edukado kaj trejnado de Cseh-instruistoj okupiĝas ĉefe Internacia Esperanto-Instituto, kiu povas rekomendi al la dezirantoj geografie proksiman instruiston. Skribu al:

Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag,  
Nederlando

## INVITO

Sonja Tavĉar, la sekiestro de la slovenia sekcio de ILEI, pretas gastigi junan ĉehan aŭ slovakon instruit(in)on dum la kristnaska libertempo dum unu semajno. Ŝia loĝloko estas pitoreska vilaĝo apud la Adria Maro.

La gasto havu minimume B-gradan diplomon, profitu semajnon da konversaciado kaj diskutado pri pedagogiaj temoj, kaj estu preta komenci instrui esperanton en sia klaso post la reveno. Dezirantoj skribu sinprezente al:

s-ino Sonja Tavĉar,  
Liminjanska 6, SLO-66320 Portoroz,  
Slovenio.  
Telefona: (66)-70177.  
laŭ IPR 3/92

## Esperanta ago-tago en Romo kaj Bruselo

En Bruselo partoprenis 12 gesamideanoj en la tiea manifestado, organizita de la bruse-la esperanto-grupo. Informoj pri ĝi estas disdonita al ĉiuj belgaj ĵurnaloj kaj estraranoj de televidstacioj, sed ĝis nun sen reagoj.



En Romo jam estis la sepa fojo ene de kvin jaroj, ke ĉ. 20 esperantistoj arigis antaŭ la sidejo de la nacia televido RAI. La dissenditaj informoj ankoraŭ ne aperis en amaskomunikiloj, sed rezulto aperis en verdula kampo: Al la ministro pri Publika Instruado estas prezentita parlamenta demando de la verdula grupestro pri la lingva problemo. Sekve de tio, pri tiu ĉi temo la gazeto de la verdula partio aperigis longan artikolon de A. Menabene.



## Manifestacio por esperanto en Tuluzo

Organizite de EKC (*Esperanto Kultur-Centro en Tuluzo*) kvindeko da esperantistoj manifestaciis antaŭ la sidejoj de televidstacio *France-3* kaj ĵurnalo *La Dépêche du Midi*. EKC grupigas membrojn de diversaj esperanto-asocioj de la regiono, aliĝintaj ĉu al UFE (UEA), ĉu al SAT-Amikaro, ĉu al la Esperanto-Fervojoj, ĉu sendependaj kiel EUROKKA (Esperanto-Rok-Asocio).

La manifestacio celis malfermi publikan debaton pri la problemoj de komunikado kaj de la lingvoj en la baldaŭa Grand-Eŭropo, kaj prezenti esperanton kiel ĝusta solvo por ĉiuj. Ĝia rezulto estis sufiĉe pozitiva.

*France-3* proponis raporton pri esperanto enkadre de la regiona okcitana programero. *La Dépêche du Midi* aperigis artikolon pri niaj postuloj kaj informojn pri EKC kaj la e-kursoj, kun la kontaktadreso kaj la telefonnumeroj de tri respondeculoj. La ĵurnalisto promesis ankaŭ tion, ke li aperigos la informojn, kiujn ni sendos al li estonte.

Eksciinte pri tiu ago-tago, *TLT (Télé-Toulouse, loka televidstacio)* proponis, ke ni prezentu esperanton kaj EKC-on en la antaŭa tago, tio estis la 9-an de oktobro. Temas pri 15-minuta rekta televid-elsendo kun Jomo (*Jean-Marc Leclercq*), la kantisto de la rokbando *La Rozmariaj Beboj*, kaj Flo! (*Floréal Martorell*) de EUROKKA.

Denova, baldaŭa rendezuo estas fiksota por pli longa debato en *TLT*, al kiu estos invititaj ĉirkaŭ tablon esperantistoj kaj kontraŭuloj.

Krome, kunlaboro efektiviĝis kun la okcitanistoj en Tuluzo. (La okcitana estas regiona lingvo en suda Francio). La okcitanistoj invitis nin al kunlaborado en ilia "*Festo de la Ling-*

*voj '93*", kiu okazos de la 20-a de marto ĝis la 3-a de aprilo 1993. Tiu grandega festo prezentos ĉefe la minoritatajn lingvojn. Tie okazos ekspozicio pri esperanto, prelegdebato ĉe la universitato kun Claude Piron (konfirmote), kaj spektakloj por plenkreskuloj kaj por infanoj.



Por la bona eko, ĉiuj informoj, dokumentoj, libroj, broŝuroj, informiloj, spertoj, kunlaboroj, proponoj, sugestoj, ktp estas bonvenaj ĉe EKC:

*Esperanto-Kultur-Centro*  
1, rue Jean-Aillet  
F-31000 TOULOUSE, Francio

## DOKUMENTOJ DE UN

Haveblas en esperanto du dokumentoj de la Unuiĝintaj Nacioj: Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj Statuto de la Internacia Kortumo (la du lastaj en unu dokumento).

Por ricevi la Deklaracion bonvolu sendi malgrandan blankan adresitan por vi (!) koverton kaj 1 respondkuponon, por ricevi ambaŭ dokumentojn sendu mezgrandan adresitan koverton kaj 2 IRK al:

*UEA-oficejo ĉe UN, 777 UN Plaza Suite 1, New York, NY-10017, Usono.*

## Lingvo

### La etnoj de eksa USSR: KIEL NOMI ILIN?

Kiel konate, Sovetunio estis giganta ŝtato, en kiu vivis multegaj etnoj same kiel partetoj de apudaj popoloj kaj de disaj diasporoj. Post la Oktobra revolucio (1917) la mondo spektis neniam antaŭe viditan eksperimenton de etnokonstruo: la nova soveta ŝtato sendis lingvikistojn al nomadaj boacbredistoj kaj glaciejaj fiŝkaptistoj por doni skriban formon al ties lingvoj kaj krei novajn alfabetojn.

Oni agnoskis tre dubinde idiomajn kiel lingvojn (ekzemple la moldavan) kaj ignoris turkojn kaj sameojn.

Popolnombradon post popolnombrado, la listo de la soveta etnoj malplilongigis, ĉar la pli malgrandaj estis kunfandantaj kun la pli grandaj apudaj. Mala procezo okazas nuntempe, kun la etna revekiĝo de la lastaj jaroj. Listigi la soveta etnoj estas, do, malfacile.

Sed la ĉefa celo de tiu ĉi teksto estas proponi por ili definitivajn nomojn en la Interna-

cia Lingvo konsiderante ne nur la rusan version, kiu plej ofte estis normiga por la (ne nur) okcidentaj lingvoj, sed ankaŭ la sinnomon de la koncerna etno, t.e. kiel ĝi nomas sin mem. Foje tio ne eblis, ĉar ne ĉiuj popoloj havas nomon (!), aŭ ĉar ĝi estas tro malinternacia kaj la popolo tro multe aŭ tro malmulte konata.

Ĉar la preferoj de etnismo direktiĝas ĉiukaze favore al la sinnoj, ni ĝojos pri eventuala reago de, ekz. abhaza esperantisto, kiu informus nin pri la nomo, kiun li/ŝi donas al sia etno en esperanto.

Por la momento jen nia listo farita ĉefe surbaze de kvar libroj, sed ankaŭ per konsultado de pluraj tekstoj kaj de multaj vortaroj koncerne tradukojn el la diversaj lingvoj en la rusan.

La aŭtoro dividas la etnoj jene kaj klarigas la devenon de la nomoj kaj la esperantan formon:

- 1. La etnaj insuloj kaj duoninsuloj

En eks-Sovetunio loĝas kelkaj etnoj, kiuj havas sian hejmlon ekster USSR. Temas pri: afganoj, ainoj, albanoj, araboj, aturoj, beluĉoj, bulgaroj, ĉeĥoj, ĉinoj, dunganoj, estonoj, germanoj, grekoj, inukoj, judoj, koreoj, kurdoj, latvoj, litovoj, madjaroj, mongoloj, persoj, poloj, roma-


oj, rumanoj, sameoj, serboj, slovakoj, suomoj kaj turkoj.

- 2. La etnoj havantaj (sovjet)respublikon  
La nomoj de jenaj etnoj estas akceptataj sendiskute: bielorusoj, kirgizoj, rusoj, taĝikoj, turkmenoj kaj uzbekoj.
- 3. La etnoj kiuj havas aŭtonoman respublikon  
a/ ene de Rusio: balkaroj, baŝkiroj, buriatoj, ĉuvaŝoj kaj tataroj  
b/ ene de Kartvelio:  
Temas pri abhazoj kaj aĝaroj. Ĉi lastaj estas simple muzulmanaj kartveloj.  
c/ ene de Uzbekio
- 4. Etnoj kiuj havas aŭtonoman regionon  
a/ ene de Rusio  
b/ ene de Taĝikio
- 5. Etnoj kun aŭtonoma distrikto
- 6. La senaŭtonomecaj popoloj

laŭ "*Etnismo*", n-ro 50,  
kaj la *Ondo de Esperanto*, maj'92.

Pli detale vi legu la originalan artikolon en la revuo "*Etnismo*" n-ro 50.

Adreso de la redakcio: Im Römerfeld 44,  
DW-5180 Eschweiler, Germanio.



**Responde al Georgo Kamaĉo**

Dum la estrarkunsido de NZEA (Nov-Zelanda E-Asocio), okazinta la 5-an de novembro, la estraranoj diskutis la artikolon de s-ro Major en la revuo "Nov-Zelanda Esperantisto", kaj vian leteron responde.

La estraranoj deziras, ke Vi kaj s-ro Major diskutu la aferon private. La opinioj de s-ro Major tute ne reflektas la opinion de la estraro de NZEA, kaj ili volas lasi la aferon inter Vi kaj s-ro Major.

Ni dankas Vin pro via intereso kaj esperas, ke de tempo al tempo Vi kontaktos nin.

Sincere via

A.J. Knight, sekr. de NZEA

Dankojn pro la neofendiĝinta sinteno kaj sinceraj vortoj. Per tio ni finas la ĉi-teman diskuton en EVENTOJ. La red.

\*\*\*\*\*

**Estimata Eventoj**

En la revuo Esperanto, en junio 1989, en n-ro 1002 (6) estis ĝuste sama bildo pri kombinaĵoj de la simbolo kiel en junia (1992) numero de Eventoj. (Temas pri la nova, elipsa simbolo kun stelo supre, kaj enskribo "ESPERANTO" sube. La red.)

Ĉar la bildo tiam en la revuo Esperanto aperis pro mia propono, ĝojigis min denove vidi ĝin. Laŭ mi ĝi estas bela kaj alloga, eble iu alia ankaŭ kombinis ĝin tiel.

Kaj la uzo de la kombinaĵo en la oktobra (1992) numero de Eventoj ŝajnis trege taŭga kaj eleganta. Kun salutoj

Anja Launiainen  
Kevätmäentie 6  
20780 Kaarina  
Finnlando



**Nova redaktoro de ItInfo**

La ĝisnuna redaktoro de ITINFO (internacie konata informilo de Itala Esperanto-Junularo, IEJ), Alessandro Amerio en la ĉijara jarkunveno iĝis la prezidanto de IEJ, do la redaktajn taskojn transprenis ĉi-septembre Pier Luigi Cinquantini. Kontaktadreso:

P. L. Cinquantini, via D. Alighieri 2,  
I-01010 Blera (VT), Italio.  
Telefono: +39-761-479075,  
telefakso (en laboroficejo): +39-766-840444

**Esperanto en radio**

**Ĉesigo de esperanto-radioelsendoj:  
Ĉu malvenko  
aŭ natura evoluo?**

Dum la pasintaj jaroj ni fieris kaj fanfaronis pri la multaj radio-elsendoj en esperanto. Tamen nun en kelkaj landoj la instancoj repensas pri la utileco de tiuj programoj. Kompreneble oni ne elsendas por plaĉi al la esperantistaro. Oni uzis la lingvon por propagandi la ideologiojn kaj la politikajn starpunktojn de la nacioj uzantaj ĝin. Nun oni emas klopori por interesi la aŭskultantojn pri la turismaj allogaĵoj de la elsendanta lando.

Nu, ĉu vere estas granda aŭskultantaro? Laŭ la pesimismaj taksoj de la movadestroj (kiujn mi fakte ne kredas) ekzistas nur du/tri milionoj da homoj, kiuj povus kompreni tiajn elsendojn eĉ se ili povus kapti ilin. Jes, je instigado de niaj gazetoj, esperantistoj sufiĉe amase skribas leterojn al la stacioj. Tamen, ĉu ili regule aŭskultas la programojn? Ĉu VI, leganto, ofte aŭskultas radio-programojn vialandajn, je la tempo, kiam okazas la e-elsendoj? Ĉu ne prefere VI spektas TV-on? Ĉu VI kutime aŭskultas fremdajn elsendojn, eĉ en via lingvo, facile kaj bone kapteblajn? Dum militoj aŭ gravaj internaciaj disputoj oni eble



volas aŭdi, kion diras la alia flanko, sed kutime oni preferas fidi je la patriaj programoj.

Laŭ mia sperto, e-programoj estas malfacile kapteblaj, suferas pro perturboj atmosferaj aŭ fadado, kaj okazas nur dum kelkaj minutoj. Ili okazas dum la elsendo de pli allogaj hejmaj radio-elsendoj aŭ TV-programoj, aŭ kiam mi estas laboranta pri io al mi pli grava. Eĉ kiam mi intencas aŭskulti e-programon, mi ofte forgesas, ĝis la 15-30-minuta elsendo estas jam duonfinita.

Nun persatelitaj elsendoj de TV-programoj komencas ebligi al homoj, eĉ

se tiuj loĝas en fremda lando, spekti sialandajn elsendojn. Do, kiujn servojn radio-elsendoj en esperanto povas proponi? Verŝajne la estonto de e-elsendoj povus esti informado al vizitantoj el multaj landoj pri trafikaj kaj turismaj aferoj enlandaj. Tiam informadon oni ne povas ricevi ĉiam sialingve. Tiajn elsendojn oni supozeble povus facile kapti per ricevilo en

aŭto: la stacioj estus proksimaj.

Se homoj ektrovus, ke informo estas havebla per esperanto en horaroj, telefonkioskoj kaj per turismaj radio-elsendoj, ili havus pluan instigon lerni la lingvon. La ĉesigo de fremdlingvaj elsendoj translimaj - ne nur tiuj en esperanto - estas logika velkado de ne plu grava propagandilo.

PALMER Henry  
Milverton, Britio

**Internacia konkurso por lerneĵanoj**

**3-A TASKFOLIO POR BAZLERNEĴANOJ**

- 1. Kompletigu la frazon per konvenaj finaĵoj!  
*Du nigr... kat... vol... manĝ... unu griz... mus...* (3 poentoj)
- 2. Kio estas la ŝatata manĝaĵo de la sekvaj bestoj?  
*araneo, cikonio, ĉevalo, foko, leono, simio* (3 poentoj)
- 3. Diru ĉiun per unu vorto!  
*milo da gramoj / dekonono de metro / cent litroj* (3 poentoj)
- 4. Faru frazon el ses vortoj, ĉiu kun komenca "m"! (3 poentoj)
- 5. Serĉu almenaŭ ses kunmetitajn vortojn kun -tuko! (3 poentoj)
- 6. Solvu la enigmojn: (3 poentoj)

$\frac{i}{te}$  / P (RL) A / 3OP

- 7. Menciu almenaŭ du eŭropajn urbojn, kiuj elsendas E-radioprogramon. (2 poentoj)

**ONI POVAS IAM AJN ALIĜI AL LA KONKURSO!** Regularon vidu en la numero aŭgusto (1)-92.

La solvojn sendu ĝis la 21a de decembro al:

Nagy László Általános Iskola, esperanto-grupo,  
Anna tér 1, H-8500 Pápa, Hungario.



## Anoncetoj

Borjana Vasiljeva, pk. 74, BG-1220 Sofio, Bulgario organizas kontaktejon edziĝecele por solecaj geesperantistoj.

Ni proponas senpagan ĉambron kaj gastigemon al unu aŭ du israelaj esperantistaj vizitantoj de Berlino (krom majo-junio kaj septembro-oktobro). Varma, ne koŝera vespermanĝo eblas kune kun ni. Bv. skribi ses semajnojn antaŭe por ebligi interkoncenton.

Ludwig kaj Wiltrud Heise, Hochbaumstr. 69, D-1000 Berlin 37, Germanio.

Kunvenoj de Sarlanda Esperanto-Ligo okazas ĉiulunde, je la 19a horo en la gastejo "Hauck Weinstuben" en St. Johanner Markt 7, Sarbrukeno. Vizitantoj bonvenas!

Telefono: +49-681-31919.

*Son-gazeto*



somero 1992

Son-gazeto  
Najtingalo  
redaktoro: REZA

N-ro 2  
Adreso: Tokio, C.P.O. Box 405, 100-91 Japanio  
Kopieto permesita al nepagopovaj Esperantistoj

## Nova son-gazeto "Najtingalo"

La ideo estas per ĝi ne nur interligi la aziajn movadanojn, sed ankaŭ informi eksterazian Esperanton pri tiuj relative nekonataj kontinento, movadoj, kulturoj, ktp.

Specialaj valoroj de la songazeto estas, ke ĝi fortigas la komprenkapablon de esperantistoj, kiuj malofte havas oportunon aŭdi la voĉojn de eksterlandanoj, doni muzikan ĝojon per esperanto-kantoj, helpi la blindajn esperantistojn, ktp.

Najtingalo aperas sezone, do kvarfoje jare. Adreso de la redaktanto:

P.O.Box 405, CPO Tokyo, J-100-91 Japanio.  
el Aŭstralia Esperantisto, nov/92.

EVENTOJ, eszperantó nyelvű információs lap.  
Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.  
A kiadó és a szerkesztőség címe:  
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.  
Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELIR.  
Készült az M & M nyomdában:  
H-1161 Budapest, Bercsényi u. 10.  
EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.  
Eldonas Kultura Esperanto-Asocio  
kaj LINGVO-Studio, Budapest.  
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.  
La redakcia ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.

## Kiel aboni al EVENTOJ?

1. Plenigu la abonilon, aŭ skribu leteron kun la sama enhavo, kaj sendu ĝin al la redakcio (LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87. Hungario).

2. Pagu la abonkotizon al vialanda peranto listigitaj sube en la koncerna nacia valuto kaj sumo. La baza abonkotizo por 1993 estas 59 guldenoj, (aere: 68 guldenoj), por orient-eŭropaj landoj: 23 guldenoj.

3. La revuon vi ricevos rekte el Hungario perpoŝte.

## Kiel pagi?

- Sendu la kotizon al vialanda kotizperanto (perpoŝte aŭ poŝtĝirkonte) - en nacia valuto.

- Sendu la monon al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, kodo ELLS-S, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. (59 gld, aere: 68 gld.)

- Sendu la monon rekte al la redakcio per simpla internacia poŝtmandato, aŭ perbanke al Banko OTP, Budapest XVIII, Konto 218-98189/542-030808-7. Vi povas sendi ankaŭ euroĉekon. La valuto sur ĝi devas esti en ajna tipo de konvertebla valuto. Sur la dorsa flanko nepre skribu la numeron de via bankkarto!

- En fina kazo - je via risko - sendu monbiletojn (en konvertebla valuto inkluzive forintojn) en fermita koverto al la redakcio.

## Landaj kotizperantoj

**Aŭstralo:** Libroservo de EAE, Tom Elliott, Pk. 230, Matraville, 2036 N.S.W.

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg (pĉk. 7.127.144). -345 ATS.

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). - 1080 BEF, aere: 1250 BEF.

**Brazilio:** Brazila Esperanto-Ligo, Cx. Postal 03625, Brasilia (DF) 70084.

**Britio:** Paul Hewitt, 26 Higfield Rd, North Thoresby, Grimsby, S. Humbs, DN36 5RT. - 22 GBP, aere: 25 GBP.

**Bulgario:** Ljubomir Trifonĉocskij, Al. Stambolijski 17, ap. 11, BG-3000 Vraca. - 330 levjoj.

**Ĉeĥoslovakio:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Vladimír Dvořák, Jiřka 10, CS-110 00 Praha-1. - 360 KCS.

**Danio:** Eckhard Bick, Rugbjergvej 98, DK-8260 Viby-J. (Poŝtĝinnumero: 696 47 37)

**Finnlando:** Oy Mendoservo, Lasse Kivis-

tö, Kivistöntie Hyvinkää, SF-05510.

- 166 FIM, aere: 192 FIM.

**Francio:** UFE, 4. bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk. 855-35 D Paris).

- 185 FRF, aere: 215 FRF.

**Germanio:** Monda Merkato, Alfred Schubert, Pf. 1539, DW-8120 Weilheim, (konto 365255-806, postĝiroamt München, BLZ 700 100 80). - 54 DEM.

**Hungario:** LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87. - 980 Ft.

**Hispanio:** Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila 127, p.7, 2º izda, E-39007 Santander (Cantabria) Bankkonto ĉe Caja Postal n-ro 03548531 (O.P.)

**Islando:** Libroservo de IEA, Saemundsson Hallgrimur, Godatuni 10, IS-210 Gardabae.

**Israelo:** Aviv Faklieru, Pk. 8383, IL-61083 Tel-Aviv, (konto 403679, Bank Mizrahi, Faklieru Esperanto).

**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk. 37312204). - 46 m ITL, aere: 53 m ITL.

**Japanio:** Rondo Harmonia, Yamaguti Sin'iti, Tutihara 3-205, Tenpaku-ku, J-468 Nagoya-si. - 4600 JPY, aere: 5300 JPY.

**Koreio:** Seula E-Kulturcentro, Jung-Kee Lee, C.P.O. Box 3047, Seoul, 100-630.

**Kroatio:** Kroatia E-Unuiĝo, M. Beloŝeviĉ, Trg Burze 2, HRV-41000 Zagreb.

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo, poŝtĝirokonto 0809 5100318.

**Polio:** P.W.H. NEPO, skrytka 105, Maciej Wnuk, ul. Broniewskiego 77. m. 137, PL-01865 Warszawa. - 236.000 PLZ.

**Portugalo:** Libroservo de Portugala Esperanto-Asocio, Rua rd. Joao Couto 6, R/C-A, P-1500 Lisboa.

**Sud-Afriko:** Colin Beckford, PO Box 1227, SA-8000 Cape Town.

**Svedio:** Sveda Esperanto Federacio, SEF, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby.

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen.

- 47 CHF, aere: 54 CHF.

**Usono:** E-Ligo por Norda Ameriko, Mike Donohoo, POB 1129, El Cerrito, CA-94530. - 35 USD, aere: 40 USD.

**Venezuelo:** Prof. J. E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.

sendu al: EVENTOJ, H-1675 Budapest pk. 87, Hungario

## ABONILO

Jes, mi abonas al la gazeto EVENTOJ por 1993.

Familia nomo, nomo: .....

Preciza adreso: .....


poŝta kodo: .....

La abonprezon de ..... (sumo) mi pagis al: .....

Dato: ..... Subskribo: .....



# Historio



ubileo! ... dudekkvinjara jubileo!  
... kvaroncentjara jubileo de esperantisteco!"

Dudek kvin jaroj estas multa tempo eĉ en la ordinara, senemocia homa vivo; tiom pli multa ĝi estas por esperantisto. Pli ol la duono ĝi estas de la vivo de Esperanto

mem, kaj preskaŭ la duono de mia propra vivo. Permesu do al mi, kara leganto, ke mi "festu" mian jubileon per jena babilado, per kiu mi intencas fari al vi fidelan raporton de la historio de mia persona vivo koncernanta Esperanton. Eble tiu ĉi kvazaŭfelieta serio ne estos tre interesa por vi, sed sciu, ke mi ĝuas skribante jenajn liniojn, ĉar dum la skribo mi kvazaŭ duafoje travivas tiujn dudek kvin jarojn, kiujn mi pasigis en la mondo de la plej nobla homa ideo; tial mi esperas, ke vi estos indulga juĝisto kaj ne kulpigos min je troa egoismo kaj vanteco.

Ĉar mi ne volas tedi la leganton per longaj aŭtobiografiaj priskriboj, per komplikitaj perifrazoj: mi tuj komencas mian raporton, klopodante skribi mallonge, konservante la objektecon.

\*\*\*\*\*

Antaŭ ĉio mi devas diri, ke mi posedis malgrandan presejon, nur kun unu mana maŝino, en la urbo Szekszárd (Hungario).

En la jaro 1897-a, kiam mi estis 29-jara, tute hazarde falis en miajn manojn prospekto anoncanta baldaŭan aperon de lernolibro de Esperanto, verkata de S-ro Abeló Barabás. Tiu prospekto enhavis la legregulojn, cetere ekstrakton el la gramatiko, el la sufiksado kaj eĉ el la vortaro de nia lingvo, kaj, krom tio, prezentis tekstojn prozajn kaj versajn.

Ĝis tiam mi nenion aŭdis pri Esperanto.

- Jen nova volapuko! - mi pensis kaj mi zorge trastudis la prospekton.

Ĝia efiko sur min estis mirinda. Tamen, mi devas konfesi, mi vidis tiam en Esperanto nur lingvon, tutmondan, universalan parolhelpilon; tiam mi ne pensis ankoraŭ, ke Esperanto, penetrante en la cerbon, penetras ankoraŭ en la animon, eĉ en la karnon, en la sangon, por transformi nin en efektivan homon...

Kompreneble, mi mendis la lernolibron en kelkaj ekzempleroj, kun la espero, ke mi certe trovos sekvantojn - por la nova lingvo, - kaj mi malpacience atendis ĝian ricevon, kio okazis post kelkaj monatoj. Ha! kiel plezure mi prenis la longe atenditan libron! Tuj mi komencis serioze lerni la lingvon, kaj post du tagoj mi jam skribis leteron al la redakcio de la sola esperantolingva gazeto Lingvo Internacia, tiam en Upsala (Svedio), por sendigi al mi ekzempleron.

Post ok tagoj mi ricevis la gazeton, kune kun letero de S-ro Paŭl Nylén, ĝia redaktoro, kiu esprimis sian surprizon pro la ĝojinda fakto, ke ekzistas esperanta lernolibro por Hungaroj; li petis min, ke mi havigu al li unu

# El miaj rememoroj

artikolo de Paŭlo Lengyel  
el "Literatura Mondo" n-roj 1-4, 1922.

ekzempleron de ĝi. Mi sendis al li la petitan libron, kaj, ĉar ĝia prezo egalas al tiu de la jarabono de la gazeto, per tiu sendo mi fariĝis abonanto de Lingvo Internacia.

En la sekvinta numero aperis detala, tre favora raporto pri la hungara lernolibro.

\*\*\*\*\*

Intertempe, inter S-ro Nylén kaj mi estiĝis varma korespondado, vere amika. Dank' al S-ro Nylén, mi tiam sciigis, ke Esperanto ne estas nur lingvo, sed io alia, io multe pli alta, multe pli majesta, - ĉar ĝi, penetrante en mian cerbon, penetris ankoraŭ en mian animon, en mian karnon, en mian sangon; kaj tiam mi fariĝis ... esperantisto, esperantisto en la plej sankta senco de l' vorto.

De tiam mi sentis ĉiam nepriskribebajn ĝojon, kiam mi ricevis numeron de nia amata Lingvo Internacia, (mi bone memoras ankoraŭ, kvazaŭ mi eĉ hodiaŭ vidus ĝin: ĝi estis banderolita en blua papero, kun presita adreso sur citronflava paperrubando surgluita). Mia plej ŝatata legaĵo estis ĝi. Por unu el ĝiaj tiamaj numeroj mi eĉ verkis humorajeton titolitan "Malhelpita bigamio"; tiu ĉi estis mia unua esperanta verko.

Baldaŭ mi havis multajn diverslandajn korespondantojn, el kiuj kelkaj poste fariĝis famekonataj samideanoj.

\*\*\*\*\*

Bedaŭrinde, mi estis izolita esperantisto, sola en mia urbo. Mi provis esperantistigi kelkajn amikojn, sed vane, mi ne sukcesis, ili respondis al mi, ke ili ne estas "frenozaj"; ke ili malŝategas tiun "fantazmagorian utopion"; ke mi estas "maniulo"; ke ĉiu esperantisto estas "sen-cerebulo", ilin oni devus enfermi en frenezulejon, ktp. -Ho! la bela rozo de Esperanto havis ankoraŭ dornojn: ĉie mi renkontis nur mokridojn. Sed tiuj dornoj ne povis min korpiki; mia koro ja plena estis de entuziasmo, ne restis en ĝi spaco por la dornoj. Mi do mokridis la mokridantojn kaj daŭrigis mian vojon.

\*\*\*\*\*

En tiu tempo fondiĝis ankoraŭ alia gazeto: L'Espérantiste, en Francio, redaktita france kaj esperante. Ankoraŭ ĝin mi diligente legis.

La redakcio de tiu ĉi gazeto tiam organizis esperantan literaturan konkurson, kiun ankoraŭ mi partoprenis kaj mi sukcesis gajni trian premion: arĝentan bronzopalmon. Tiu neesperita prospero multe fierigis kaj energiigis min, tiom pli, ĉar eĉ kelkaj hungaraj gazetoj parolis pri tiu fakto.

En la jaro 1899-a mi verkis la Libron de l' Humoraĵo, mian unuan libron, por kiu mia kara amiko Nylén bonvolis skribi antaŭparolon tre ĉarman. Tiun libron mi presis en mia presejo; ĝi baldaŭ disvendiĝis.)

En la fino de la sama jaro Lingvo Internacia deklaris, ke ĝi, post kvarjara vivo, devas ĉesigi sian ekzistadon, pro financaj kaŭzoj, precipe pro manko de sufiĉa nombro da abonantoj. Tiu cirkonstanco tre malĝojigis min, ĉar mi estis konvinkita, ke L'Espérantiste ne povos daŭrigi tiun rolon, kiun la malaperonta Lingvo Internacia plenumis.



ed dank' al mia intima korespondado kun S-ro Nylén, ni sukcesis savi la vivon de la agonianta gazeto: mi entreprenis ĝian eldonon kaj presadon, kaj li restis redaktoro. Tiam ĝi havis nur kelkdekon da abonantoj: sed kiam la esperantistaro vidis, ke la presorgano refariĝas vivokapabla, ĝi baldaŭ havis preskaŭ sufiĉe da abonantoj. S-ro Nylén do sendadis al mi la porgazetajn manuskriptojn el Svedujo en Hungarion, kaj la gazeto reaperis regule. Baldaŭ S-ro Nylén tute transcedis ĝin al mi, - kaj tiamaniere mi fariĝis "redaktoro-eldonanto-presanto-administranto" de Lingvo Internacia.

Jes, mi fariĝis redaktoro-eldonanto-presanto-administranto de "Lingvo Internacia". Al tiu kvarobla ofico mi povas aldoni kvinan: kompostisto, ĉar mi propramane kompostis la gazeton. Tia multflanka tasko certe estas tro por unu sola persono, precipe por iu, kiu estas izolita esperantisto. Tamen mi klopodis plenumi mian rolon; mi ja klopodis, sed bedaŭrinde ne sukcesis. La gazeto, kompreneble, ne estis sur tia nivelo, sur kia ĝi estus devinta.

Mi malĝojis. Kiamaniere eliri el tiu embarasa stato, por savi la gazeton? Pri tio mi serĉis rimedon. Mi revis pri transmigro Budapeŝton; mi opiniis, ke tie, kun la helpo de la tieaj fervoraj samideanoj (ho, tre malmultaj ankoraŭ) mi povus rezultigi pli da prospero. Baldaŭ mi forlasis tiun ideon kiel nerealigneblan, precipe pro teknikaj kaj financaj kaŭzoj.

Tamen ion mi trovis en la hungara ĉefurbo; mi trovis tie fervoran teknikon kunlaboranton: S-ro Kajetano Seper, kompostisto, klera, juna esperantisto entuziasme konsentis fariĝi mia teknika kunlaboranto kaj li venis en Szekszárd. Tiamaniere ni donis fortan antaŭenpuŝon al la gazeto, sed nur en teknika rilato: ĝi aperadis regule.

Unu belan tagon (mi vere povas diri "belan") la poŝto alportis al mi leteron el Parizo. Ne estis malofte, ke mi ricevis leteron el Parizo; ĝi estis subskribita "Paul Fruictier". Tiu nomo ne estis jam nekonata por mi. S-ro Fruictier proponis al mi, ke li volus fariĝi redaktoro de "Lingvo Internacia".

Vi povas imagi, kara leganto, la korsentojn, kiujn kaŭzis al mi tiu letero. Jen la helpo, jen la savo! Kaj mi ... ŝanceliĝis; mi ne sufiĉe konis ankoraŭ S-ron Fruictier. Mi tuj skribis al la tiama Societo por la Propagando de Esperanto en Epernay (Francujo) al S-ro de Beaufront, por havigi al mi sciigojn pri tiu sinjoro. La sciigoj estis pli kontentigaj ol mi deziris, do ... S-ro Fruictier fariĝis redaktoro de "Lingvo Internacia".

Tiamaniere okazis, ke la redaktado falis en la manojn de la tria Paŭlo!...

La redaktorŝanĝo tre utile efikis al la gazeto: ĝi fariĝis serioza, plaĉa, bone informita; ĝiaj abonantoj subite plimultiĝis, tiamaniere, ke ĝi certigis al mi eĉ iom da profito. S-ro Fruictier zorge sendadis al mi la manuskriptojn kaj la gazeto fariĝis universala informilo, la vera centra organo de la esperantistoj.

La venontan jaron (1903) mi, kompreneble kun la

konsento de la redaktoro, ŝanĝis la formaton de la gazeto: ĝi fariĝis libroformata, kiun ĝi konservis por ĉiam.

"Lingvo Internacia" havis tiam ne nur sufiĉe multajn abonantojn, sed ankaŭ tre bonajn kunlaborantojn. Are venis la literaturaj manuskriptoj al la redakcio, kaj ili tiom amasiĝis, ke estis al ni absolute neeble enpresi en la gazeto eĉ la plej bonajn literaturaĵojn originalajn aŭ tradukitajn - konsiderante la modestan amplekson de la gazeto. Por forigi tiun embarason, venis al mi la ideo: estigi literaturan folion, kaj mi fondis, en julio 1903, la 12-paĝan folion titolitan "Literatura Biblioteko de Lingvo Internacia".

Tiu aldono enhavis nur literaturaĵojn kaj estis abonebla aparte de la gazeto.

Mi devas rimarkigi, ke preskaŭ ĉiuj abonantoj de "L. I." abonis ankaŭ la literaturan aldonon. Tial, post unu jaro kaj duono, ni ĉesigis la elirigon de ĝi kaj, pligrandigante L. I.-n mem, ni kunigis ĝin kun la literatura aldono.

En tiu tempo aperis, en mia presejo, la unua eldono de la fama Esperanta Sintakso de S-ro Paul Fruictier. Ankaŭ aliajn esperantaj presadoj mi pretigis, laŭ mendo de diverslandaj samideanoj.

Krom tio mi verkis artikolojn propagandajn pri Esperanto por kelkaj hungaraj gazetoj kaj ĵurnaloj, kiujn iliaj redakcioj enpresis bonvole. Tiuj artikoloj bone efikis kaj havis, kvankam ne gigantan, tamen ŝatindan rezulton por nia afero.

\* \* \* \* \*

La homo neniam estas kontenta; li ĉiam deziras por si plibonigon, eĉ se lia sorto estas superfavora. Ankaŭ mi ne estis kontenta, kvankam la afero de "Lingvo Internacia" pli bone aranĝiĝis ol mi estis dezirinta. Tiam mi pripenis: kiel agrable, kiel oportune, kiel komforte estus, se la redakcio kaj administracio troviĝus en la sama urbo! Se mi transmigrus Parizon ... Ha! Utopio! ... Kial utopio? Certe, la monto neniam irus al Mohamedo; sed Mohamed ja povas iri al la monto. Kaj tiu ideo ne volis forlasi min; ĝi tiel fiksiĝis en mia animo, ke mi ne povis liberigi min de ĝi.

Tial, en unu letero, kiun mi skribis al S-ro Fruictier, mi aldonis kiel preteriran ekkriion: kiel bone estus, se ... k.t.p. - Kaj S-ro Fruictier respondis same: jes ja, kiel bone estus, se ... k.t.p.

Dirite, farite.

Kaj tiam nia interkorespondado temadis ĉirkaŭ tiu ideo. Kaj ĝia rezulto estis, ke ni enpresis en la gazeto alvokon al la tutmonda esperantistaro por fondi propran eldonejon-presejon, akcian societeton, kies centro estus en Parizo. Kaj la esperantistoj are aĉetis akciojn, tiamaniere, ke baldaŭ kunestis la necesa sumo por fondo de la "Presa Esperantista Societo".

Mia transmigro estis decidita. En septembro 1904 mi rapide disvendis mian presejon, konservante el ĝi nur tiujn ilojn, kiujn mi juĝis utilaj en Parizo, - kaj, kun mia familio kaj kun mia preshelpanto mi forlasis Hungarujon, por fariĝi loĝantoj de Francujo.

daŭrigota